

Christoph Klausener,
Mutigis ĉiu bird' kantanta

tradukita de Hans-Jörg Kindler

Argiope-informo:

La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.

Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Christoph Klausener,
Mutigis ĉiuj birdokantoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

De l' birdoj kantaj melodioj

ne plu aŭdeblas nun ...

Nudiĝas kverkoj kaj tilioj,

malsupren falas la folioj

en nokton de aŭtun'.

La fagoj de espero via

jen staras sen foli' ...

Ne plu videblas stelo ia,

kaj tra nebul' melankolia

trairi devas vi.

Abioj de tristeco via

nur jen rektigas sin ...

En via brust' kaŝendas ĉia

memor' somera idilia –

en vi ardigu ĝin.

...

*Traduko de la Germana poemo “Verstummt sind alle Vogel-
lieder” de CHRISTOPH KLAUSENER (Jean-Willibrord (Willy)
Schmit, *1917-12-30 – †1982-08-28) en Esperanton de
HANS-JÖRG KINDLER (Trixini).*

Arg-41-81 (2003-12-23 23:00:24)

*Traduko de la Germana poemo “Verstummt
sind alle Vogellieder” de CHRISTOPH KLAU-
SENER (Jean-Willibrord (Willy) Schmit,
*1917-12-30 – †1982-08-28) en Esperan-
ton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred
Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde,
Germanio, *1938-11-04) en 2001-11-03.*

Arg-41-82 (2003-12-24 01:07:04)

*MR-369-3 Christoph Klausener, kies civila
nomo estis Jean-Willibrord Schmit - li uzis
la voknomon Willy - estis luksemburga li-
rikisto. Li naskiĝis en 1917 en la Luksem-
burga urbo Echternach kaj mortis en 1982
en Weilerbach en Luksemburgio. Li studis
en la universitato de Freiburg en Svislan-
do kaj poste gvidis la familian entrepre-
non. Parton de sia vivo li pasigis en la
Benediktena abatejo Sankta Maŭricio (St.
Maurice) en Clerf en Luksemburgio. Kro-
me li aktivis en la tuteŭropa (paneŭropa)
movado. Inter la jaroj 1939 kaj 1982 ape-
ris ses poem-volumoj de li. Pluaj indikoj pri
W. Schmit (Chr. Klausener) estas trove-
blaj en la aŭtoro-bild-leksikono “Lichtband-
Autoren-Bildlexikon”, eldonita de P. Koryl-
lis, Dülmen 1980. La rajtojn pri liaj verkoj
posedas lia filo Carlo Schmit (4, rue Michel
Lucius, L-1949-Howald). Li donis la perme-
son por la publikigo de la poemo en tiu ĉi da-
tumbenka. Por pluaj publikigoj pere de ali-
uloj necesas speciala permeso de s-ro Carlo
Schmit.*